# Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 4-an de Septembro 2023

**Ĉeestantoj:** Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Inbar Mor, Amri Wandel.
**Zome:** Mikaelo Lineckij, Ŝlomo Ŝaĥar, Gabi Zeevi.

***Protokolo** de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.*

## 1. Raportoj

**Amri**: la somerfina renkontiĝo en ***Piazza Grande*** en Sarona – estis tre sukcesa. Partoprenis ĉ. 20 homoj, inter ili du novaj junaj esperantistoj, kiuj lernis memstare, unu eĉ ĉeestis en la lasta UK.

## 2. La Zamenhofa Vespero (Jehoŝua)

Ĝi okazu lunde, la 18-an de Decembro, je 17h45, hibride: en Alon-Turo-2 kaj zome. La programo mem komenciĝu je 18h00. **Ŝlomo** havos ion por diskuti kaj voĉdonigi.

## 3. La Kontrol-Komisiono (Jehoŝua)

Estas certaj punktoj en ties raporto, kiujn ni devus pripensi. Ekzemple: kiu havas subskrib-rajton kaj en kiu sfero kaj kiu aprobas kion? **Ŝlomo**: estas temoj, kiujn ni prefere ne tuŝu! **Jehoŝua**: ili ja nur rekomendas, ne devigas; mi povus prezenti ĉi tion en la Ĝenerala Kunveno.

## 4. *Israela Esperantisto* (Mikaelo,Jehoŝua)

**Jehoŝua**: estis kelkaj eĥoj pri la bulteno jam el la UK en Torino, kie estis disdonitaj ekzempleroj de la nova numero. Pliaj eĥoj venis ankaŭ pri la aldona paĝo disdonita dum la Somerfina Renkontiĝo. La ĝenerala impreso estis, ke ĝi estas tro personeca kaj tro politika. Ni nepre aldonu unu frazon en la kolofono ekde la venonta numero: "Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la verkintoj mem". Tia frazo aperas en multaj similaj eldonaĵoj. Kaj ĝi demetas iomete la respondecon de la ĉefredaktoro. Krome estas bezonata Redakta Komisiono. **Mikaelo**: mi jam volis proponi tion; **Gabi** estu en ĝi, ĉar ni interkonsilas. **Gabi**: estu pli ol du membroj – **Amri** havas sperton, same **Jehoŝua**. **Andreo Peĉonkin** restu provleganto, ankaŭ mi. **Amri**: mi povas rakonti, kiel estas pri la revuo ***Esperanto*** de UEA. La estraro de UEA ricevas ĝin kelkajn tagojn antaŭ la publikigo, foje trovas erarojn sed tre malofte signife intervenas: nur se artikolo aŭ anonco estas tro politika, tro tikla. Sed la redakcio devas prezenti la bultenon ĉ. unu semajnon antaŭ la sendo al la presejo. **Mikaelo**: sed la redaktoro devos fine decidi! Se tiel – la tuta finversio de nia venonta IE devas sendiĝi al la Redakta Komisiono ĝis la 5-a de decembro! **Amri**: ankaŭ la aldonitan paĝon ni devos redukti, estu en ĝi nur lingvaj kaj enhavaj korektoj, sed ne al la eksterlandaj ricevantoj, nur por israelanoj. La kaŭzo: ĝi povas inciti politikajn kritikojn kontraŭ Israelo, ĉar sufiĉas ŝanĝi la du nomojn en la ukrainia-rusia konflikto al palestina-israela, por turni la "pamfleton" kontraŭ Israelo. **Mikaelo**: sed la paĝoj estas jam presitaj kaj enkovertigitaj. **Gabi**: en ili estis investitaj privata elspezo kaj ankaŭ laboro! **Jehoŝua**: nature, ELI kovros la elspezojn de Mikaelo, kaj mi mem volontulas veturi al

**2/…**

lia domo, el- kaj enkovertigi la redaktotan de mi paĝon. **Amri**: mi sendos skribaĵojn kaj fotojn pri la UK dum unu semajno. ***Unuanime akceptita!***

**5. La venonta Israela Kongreso 2024** (Jehoŝua)
Ĝi povas okazi dum **tri noktoj** de ĵaŭdo ĝis dimanĉo inter la 4-a kaj 7-a aŭ inter la 11 kaj la 14 de Aprilo (la Pasko komenciĝas la 22-an). En Dimona estas du gastejoj, sed jam nun ne havas liberajn lokojn (laŭ Booking.com). Mi esploros telefone kaj eĉ veturos tien (supozeble al Jeruĥam) por vidi la kondiĉojn kaj por negoci. **Amri**: en Jeruĥam mi konas bonan hotelon, ***Irus Hamidbar***, en kiu mi gastis antaŭ kelkaj jaroj**.**

**La venonta kunsido**: lunde, la 9-an de Oktobro 2023, je la 20:00

*Protokolis: **Gabi Zeevi***